


KATALIN KOVÁTS

DETEKTIVU PRI LA KRIMO DE KATRINA



EKZERKARO

KREITA POR LA RAKONTO DE STEN JOHANSSON

ENHAVTABELO

ENHAVTABELO	2
1. Vojaĝo al sudo	3
2. Sur la maro	7
3. Kiu malaperis?	10
4. Pli da kafo	13
5. Ekskurso al strando	18
6. La rakonto de Bruno	20
7. En urbeto	22
8. Fantazia cigano	25
9. La krimo de Katrina	27
10. Reen al nordo	31
Solvoj	32
Indekso	34
APENDICO	36
El la historio de Germanio	37
Korelativa tabelo	41
Korelativa tabelo- malplena	42

1. VOJAĜO AL SUDO

1.1. Kompletigu la tekston per prepozicioj (al, en, ktp).

Ŝi pensas ____ Bruno. Ŝi vojaĝas ____ vagonaro ____ Bruno. Li estas amiko. Tre bona amiko. Katrina rigardas ____ la fenestro kaj vidas arbaron, domon, aŭton. Ŝi fermas la okulojn kaj vidas Brunon. Li ridetas kaj diras: "Saluton, Katrina! Bonvenon ____ Germanio"! Ŝi malfermas la okulojn kaj ne vidas Brunon. Li ne estas en la vagonaro. Li estas ____ Germanio, kaj ____ ŝia memoro. La vagonaro iras plu ____ sudo. Ĝi iras ____ granda arbaro ____ Svedio. Katrina vojaĝas ____ Svedio ____ Germanio. Bruno estas germano, li loĝas ____ Germanio, ____ Berlino. Sed Katrina estas svedino, ŝi loĝas ____ Svedio. Ŝi estas studentino, ŝi studas ____ la universitato ____ Gotenburgo. Sed nun ____ somero ŝi estas libera. Katrina estas libera vojaĝi, kaj ŝi ĝojas vojaĝi ____ sudo, ____ Bruno.

1.2. Rigardu la mapon kaj respondu al la demandoj pri geografio.



Kiujn landojn vi vidas sur la mapo?
Kiuj estas iliaj ĉefurboj?
Kiuj estas la naciaj lingvoj en tiuj landoj?
Kiujn landojn, kiujn urbojn vi povas ligi al la E-movado? Marku tiujn lokojn sur la mapo.
Prenu la libron 'Pasporta Servo' kaj serĉu en kiu urbo vi povus tranokti ĉe esperantistoj.
Kreu dialogon kun via partnero (kiu estas gastiganto en Pasporta Servo). Demandu, ĉu li povas gastigi vin en iu konkreta dato.

<http://www.tejo.org/eo/ps>

1.3. Kreu vian vortoliston pri veturiloj.

aviadilo		buso		ŝipo	
vagonaro		aŭto		biciklo	
tramo		metroo		motorciklo	
boato		pramŝipo		velŝipo	
helikoptero		ŝarĝaŭto		kamiono	
trajno		spacŝipo			

1.4. Donu mallongan respondon al la subaj demandoj laŭ la enhavo de la sekva frazo.

La juna Katrina vojaĝas el Svedio al Germanio per trajno kaj ŝipo al sia amiko.

Kiu vojaĝas?

Kion faras la virino?

Kia Katrina vojaĝas?


El kiu lando/De kie ŝi vojaĝas?


Al kiu lando/Kien ŝi vojaĝas?

Per kio ŝi vojaĝas?

Al kiu ŝi vojaĝas?

Al kies amiko ŝi vojaĝas?



 Konsultu la ekzercon ‘[Inspektoru](http://www.inkluzo.net)’ en la LERNILOTEKO de www.edukado.net

1.5. Kolektu pliajn esprimojn kaj kreu frazojn uzante la subajn strukturojn.

- Oni veturas / vojaĝas **per** (biciklo, trajno, kamelo,)
- Oni veturas / vojaĝas **kun** (amikoj, familio, biciklo, kato, kofro,)
- Oni veturas/ vojaĝas **el → al** (Afriko, Eŭropo, Nederlando, Usono, Francio,)
- Oni veturas/ vojaĝas **tra** (Sud-Ameriko, Hungario, Kanado, Germanio,)

1.6. Plenigu la tabelon!

La juna	Katrina	V O J A Ĝ I S	el Svedio	al Germanio	kun kofro	per vagona ro	en somero	por renkonti sian amikon, Brunon.
Maljuna	viro		el Usono	al Nederlando	kun amikino	per ŝipo	en some- ro 2008	por partopreni la 93-an Universalan Kongreson de Esperanto.

1.7. Priskribu, poste rakontu detale kien kaj kiel vi mem vojaĝis lastfoje.



1.8. Kompletigu la tekston per la mankantaj vortoj kaj vortopartoj.

Katrina ___ staras kaj iras al la kafeja _____. Ŝi aĉetas kafon kaj _____ panon. Ŝi eksidas ĉe tablo, trinkas la kafo__ kaj manĝas la _____ pano_. Katrina fermas la _____ kaj revidas Brunon. Li rid ___ as kaj diras: "Mi _____ vin"! Lia _____ estas tre klar___. Sed nun ŝi _____ voĉon _____ virino. La virino diras: "Kaj mi _____ vin"!

1.9. Rigardu kaj komprenu bone la signifon de 'unu la alia(n)'.



Li rigardas ŝin.

Ŝi rigardas lin.

Ili rigardas *unu la alian*.

Katrina malfermas la okulojn. Ŝi ne plu ĝojas. "Stulta fantazio"! ŝi pensas. Sed nun ŝi ekvidas du homojn ĉe alia tablo. Viron kaj virinon. Ili rigardas *unu la alian*. Ili ridetas *unu al la alia*. Ili diras *unu al la alia*: "Mi amas vin"! Nun ankaŭ Katrina ridetas. Tio ne estis stulta fantazio. La voĉo ne estis la voĉo de Bruno. Ŝi aŭdis ne Brunon kaj alian virinon. Ŝi aŭdis du aliajn homojn en la vagono. Du homojn ĉe alia tablo. Ili parolas *unu kun la alia*. Ili amas *unu la alian*. Ĉu Katrina amas Brunon? Eble. Ŝi ne scias. Ŝi ne konas lin tre bone. Ili estas bonaj amikoj, sed ili ne bone konas *unu la alian*. Ŝi ekkonis lin antaŭ unu jaro. Ŝi renkontis lin en festivalo. Li plaĉis al ŝi. Kaj ankaŭ ŝi plaĉis al li. Poste ili sendis leterojn *unu al la alia*. Ili estas leter-amikoj.

 Konsultu la ekzercon 'Rigardas sin' en la LERNILOTEKO de www.edukado.net

1.10. Kompletigu la tekston per 'unu al la alia(j)' kaj ties aliaj formoj.

Ŝi klarigas al li.



Li klarigas al ŝi.



Ili klarigas *unu al la alia*.

Ŝi klarigas al ili.



Ili klarigas al ŝi.



Ili klarigas *unu al la aliaj*.

Li plaĉas al ŝi.

Li plaĉas al mi.

Mi plaĉas al vi.

Mi plaĉas al vi.

Ŝi plaĉas al li.

Mi plaĉas al li.

Vi (Martin) plaĉas al mi.

Vi (Martin kaj Nora) plaĉas al mi.

Ili plaĉas unu al la alia.

Ni plaĉas unu al la alia.

Ni plaĉas unu al la alia.

Ni plaĉas unu al la aliaj.

a) Vi (M) plaĉas al ŝi.

b) Vi (M&N) plaĉas al ni.

c) Vi (M&N) plaĉas al ili.

d) Mi parolas kun vi.

e) Ŝi vivas kun vi.

f) Ni kuras sen li.

g) Mi skribas al vi.

h) Ŝi ludas sen li.

i) Ni loĝas apud vi.

j) Vi (M) helpas al mi.

k) Vi (M) iras preter mi.

l) Ŝi kuiras por ni.

Ŝi plaĉas al vi.

Ni plaĉas al vi.

Ili plaĉas al vi.

Vi (M) parolas kun mi.

Vi (M) vivas kun ŝi.

Li kuras sen ni.

Vi (M) skribas al mi.

Li ludas sen ŝi.

Vi (M&N) loĝas apud ni.

Mi helpas al vi.

Mi iras preter vi.

Ni kuiras por ŝi.

Vi plaĉas _____.

Ni plaĉas _____.

Vi plaĉas _____.

Ni parolas _____.

Vi vivas _____.

_____.

_____.

_____.

_____.

_____.

_____.

_____.